

Krisztina Tóth: Poemon starante

(Tradukis Stela Besenyei-Merger)

Mi alvenas antaŭ la gimnazon en urbeto kie omaĝe al La Tago De Poezio mi devus instrui specialan literaturan lecionon. La instruistino kun kiu mi interkonsentis jam atendas min sur la ŝtuparo antaŭ la enirejo. Ŝi nomiĝas Elizabeta, aspektas iomete nervoza, kaj tuj petas min ke antaŭ la festeno mi iru saluti la lernejestron kiu deziras paroli kun mi kelkajn vortojn.

Taŭrkola, rigora homo akceptas nin. Li igas min sidi en la fotelo antaŭ la skribotablo, li mem reiras malantaŭ tiun tablon. Poezio estas bela afero, li diras ekprelegante, kaj li pensas ke estas tre grave ke la lernantoj kleriĝu el la hodiaŭa renkontiĝo. Li esperas ke la evento okazos sen skandalo kiun li persone bedaŭrinde ne povos partopreni ĉar li devas okupiĝi pri administraj taskoj. Neniu estas, li daŭrigas kun seriozeco en sia voĉo, kiu faros tiujn taskojn anstataŭ li, kaj – en tiu momento li ekrigardas la daŭre starantan instruistinon – en tiu ĉi institucio ĉio estas lia respondeco.

Mi havas la impreson ke li estus pli ĝoja, se oni invitintus iun normalan verkiston ĉi tien, ne virinon. Iun, kiu havas barbon, lipharon, sed minimume paron da aĉaj okulvitroj. Mi subskribas la kontraktojn, transprenas la kopion kaj ĝisas lin. La lernejestro diras ke li strebos aperi je la fino de la poemdeklamado se li sukcesos fini siajn taskojn ĝustatempe.

Ekstere en la koridoro mi provas klarigi ke mi ne prepariĝis por poemdeklamado, mi prefere ŝatus babiladi kun la lernantoj, sed Elizabeta tuj respondas ke estos ebleco por tio – dek minutoj –, ili jam skribis demandojn.

Ni eniras la halon kiun plenigas la tiom bone konata ŝvitodoro de la solenaj lernejoj festoj el mia infanaĝo. La lernantoj staras belvestite, ili salutas min korse. Freŝe frizita hungara literaturinstruistino en kostumo paŝas antaŭ min, salutas min soldatece, ŝi tuj komunikas ke la lernantoj tre prepariĝis kaj nun ni aŭskultos la deklamojn. Mi kapjesas ektimante. Ŝi estos ankaŭ la moderatoro flustras al mi, sed ankoraŭ ne eksidos apud min ĉar tio estas la kutimo ke la instruisto ankaŭ kunsuferu kun la lernantoj. Mi ne komprenas kion ŝi volas diri per tio: kia suferado? – sed post kelkaj sekundoj ĉio klariĝas.

Gvidante de ŝia rigora rigardo la lernantoj unu post la alia paŝas antaŭen el la vico kaj kun malplenaj mienoj rapidege findiras la poemojn kiujn mi verkis, kaj pri kiuj sub ĵuro mi povas aserti, ke ankoraŭ en siaj presitaj versioj havis sencon. El la mallonga kompilo tio tute ne estas klare: seninspiritaj rigardoj revante nenien, malgrandaj manoj tuŝante-ludante per la rando de siaj jupoj, senideaj vizaĝoj. Por tiuj infanoj renkonti poezion estas malagrabra devo: iusenca ekzameno, kvazaŭ estus provaburo. La deklamado okazas sen eraro, post la fino la instruistino forsendas la lernantojn de la scenejo kaj ni komencas babiladi.

Mi turnas min al la spektantaro por demandi ion. Neniu volas respondi. Ili gapas min per malplenaj mienoj kiel malliberuloj senditaj al la korto. Mi timas ke la instruistino igos iun respondi do mi prefere decidas laŭtlegi esperante ke dumtempe la etoso iomete malstreĉiĝos. Mi komencas per poemo kiu rilatas al Attila József, la instruistino kapjesas aprobante mian elekton. Intertempe mi ekrimarkas ke la lernejestro eniris la halon kaj li gestas per sia mano. Evidente li volas kompreni al mi ke li alvenis.

Kiam mi finas la poemon oni komencas ekmoviĝi, ĉiu turnadas sian kapon. Apud la seĝovicoj iom pli maljuna instruistino ekpaŝas rapide kiel lastmomente alvenanta, malfruanta spektanto en kinejo. Ŝi tenas papereton en siaj manoj. La homoj en la unua vico prenas ĝin de ŝi, ili pludonas, kaj je mia plej granda surprizo la papereto alvenas sur la scenejon rekte al mi. Skribite per grandaj presitaj literoj tio estas sur ĝi: POEMON ONI DEKLAMAS STARANTE!

Tutsurprize rigardas mi supren kaj ekvidas ke la taŭrkola lernejestro denove mansvingas en mian direkton. Nun mi ekkomprenas kion li gestas: li montras ke mi ekstaru.

Mi laŭtlegas la mesaĝon en la mikrofonon. Kelkaj homoj el la unua vico kuraĝigas min kun siaj koloj entirite ke mi restu sidante. Tuj poste ili sekrete rigardas malantaŭen. Ni observas unu la alian kun la lernejestro el la du flankoj de la halo kaj mi diras en la mikrofonon, ke miajn proprajn poemojn mi dezirus laŭtlegi sidante, se li ne kontraŭas. La spirito de ribelo kaj disfalo rapidege plenigas la halon. La instruistinoj kun ruĝetaj, revoluciaj vizaĝoj atendas ke kio okazos nun. La hungara instruistino kiu sursceneje sidas apud mi respondas ke mi faru kiel mi bontrovas, kaj samtempe rigardas en la malantaŭon de la halo kvazaŭ volante certigi sian ĉefon ke ŝi tre bedaŭras la aferon: tio vere ne estis ŝia ideo, ŝi povintus diri anticipe ke vivantaj poetoj estas riskoplenaj, kaj ke Elizabeta estas tiu, kiu havis tiun tutstrangan ideon.

Mi jam komencas paroli kiam mi subite ekpensas, ke povas esti ke mi ludas per ies posteno. Ekzemple per tiu de Elizabeta kiu proponis ke oni invitu min, sed eble ankaŭ mi ludas per ies alies kiuj tenas miajn librojn en siaj manoj petante ke mi dediĉu al ili. Mi unuavice parolas al ili, kaj al la infanoj.

Tion mi provas diri en tiu senespere malfreŝaera, eĥoa halo, ke poemo estas muziko, ke la poemoj estas ni mem, poemoj estas nia esto, nia identeco, ke poemon ne parkere, sed elkore ni deklamu, ne bele, sed iel ajn kaj ie ajn. Alvenante sur sabloplena, malseka ebenaĵo, starante en kupea lumo, kuŝante sur tegmento de trajno, sur brilanta rokmuro, malrapide, pripensante, mallaŭte, balbutante.

La lernejestro foriras el la halo, la lernantoj aplaŭdas, alta knabo kun ŝvitantaj manoj transdonas florojn al mi. Eble mi restos en siaj memoroj, eble mi malaperos subite kiel ŝpuro de sovaĝa kuniklo en la arbaro – mi ne scias.